Wilhelm Hauff,

# Nokta kanto de soldato

*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

En nigra nokto tute sole
Mi staras gardon senparole,
Eraras for la penso mia
Al mia domo familia.

Al la standardo fortirita,
Ho, kiom estis mi kisita . . .
Mi tiam pensis kun malĝojo :
Mi vidas vin je l' lasta fojo!

................................
................................
................................
................................

Ho dormu dolĉe, karaj miaj!
Irante al la litoj viaj,
Vi nun per preĝo Dion gloras, –
Vi certe ankaŭ min memoras.

................................
................................
................................
................................

La horo venis, gard' alia
Stariĝos nun sur loko mia.
Mi iras dormi tute laca,
Mi vidos vin en sonĝo paca.

*Traduko de la Germana poemo "Treue Liebe" de* Wilhelm Hauff *(∗1802-11-29 – †1827-11-18) en Esperanton de* Ludwig Lazarus Zamenhof *(Ludoviko Lazaro Zamenhofo, ∗1859-12-15 – †1917-04-14).*

*Arg-1012-2050 (2014-05-17 17:15:32)*

*Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas en* http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/librejo/0012/0008.php*.*